

Johann Wolfgang von Goethe, Trovaĵo	Johann Wolfgang von Goethe, Trovita	Johann Wolfgang von Goethe, Trovita	Johann Wolfgang von Goethe, Gefunden
<i>tradukita de Ri- chard Schulz</i>	<i>tradukita de Antoni Grabowski</i>	<i>tradukita de Manfred Retzlaff</i>	
Mi vagis sola En la arbar'. Nenion serĉi Jen mia far'.	Mi foje arbaron Promene eniris, Kaj serĉi nenion En penso deziris.	Mi tra arbaro Sencele iris Kaj trovi ion Mi ne deziris.	Ich ging im Walde So für mich hin, Und nichts zu suchen, Das war mein Sinn.
Enombre vidis Floreton mi. Lumanta stelo, Okulvizi'.	Mi vidis, en ombro Jen staras floreto: Steleto lumanta Aŭ blu-okuleto.	Ĉe l' vojo vidis Mi etan floron, Kaj ege tuŝis Ĝi mian koron.	Im Schatten sah ich Ein Blümchen stehn, Wie Sterne leuchtend, Wie Äuglein schön.
Al mi plukonta Jen ĝia vort': „Ĉu ke mi velku Al frua mort' ?“	Mi volis ĝin ŝiri, Sed plore ĝi diras: “Ĉu por ke mi velku, Vi tial min ŝiras?”	Kaj kiam volis Mi ĝin deŝiri, „N rompu min!“, mi Ĝin aŭdis diri.	Ich wollt' es brechen, Da sagt' es fein: „Soll ich zum Welken Gebrochen sein?“
Mi ĝin elfosis Kun la radik' Ĝin portis domen Al la larik'.	Do mi ĝin elfosis Kun radikareto, Kaj portis al mia Ĝarden' ĉe l' dometo.	Kaj mi singarde Ĝin elterigis, Al mia domo Ĝin translokigis.	Ich grub's mit allen Den Würzlein aus, Zum Garten trug ich's, Am hübschen Haus.
Replantis tie Ĝin en la fru'. Ĝi nun kreskadas Kaj floras plu.	En loko trankvila Plantite karese, Ĝi kreskas, burĝonas, Kaj floras senĉese.	Alialoke Ĝi nun kreskadas, La eta planto Kaj plu floras.	Und pflanzt' es wieder Am stillen Ort; Nun zweigt es immer Und blüht so fort.
...

Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, *1906-07-12 - †1997-09-26) en 1984-07.

Arg-376-740 (2013-02-26 15:17:50)

Tiu ĉi poem-esperantigo aperis en la n-ro 61 (1984/7) de la Vestfaliaj Flugfolioj"; kiujn eldonis Richard Schulz, kiu loĝis tiutempo en la germana urbo Mindeno (Minden). Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.

Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (*1857-06-11 - †1921-07-04).

Arg-376-741 (2006-12-14 00:07:48)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi traduk-version en la interreto, en la retejo de s-ano Don Harlow, en <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/parnaso/>, precize sub <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/parnaso/trovita.html>.

Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1982-05-05.

MR-010-1 / Arg-376-739 (2006-12-11 22:15:22)

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22).

Arg-376-738 (2006-12-11 22:11:49)